

Enhavtabelo	Paĝoj
George Sand estas precipe konata kiel verkistino, sed ŝi estis antaŭulino en la kampoj de feminismo kaj antaŭgardo de la naturo. Artikolo freŝdate aperinta en loka gazeto igis ŝin remalkovri al ni.	1 2 3
En St Pierre des Corps eble nur la stacidomon vi konas. Veras, ke la urbo disvolviĝis dank al la fervojo. Sed la libro, kiun oni prezentas tie ĉi, sciigos al vi multe pli pri la fervoja heredaĵo de tiu urbo.	4
Nassira El Moadem ĉiusomere revenas en Marokon. Ŝi vojaĝas de Parizo al Kasablanko per veturilo dum la infanaĝo, per aviadilo dum la kreska aĝo kaj per trajno nun. En tiu libro ŝi informas kaj konsilas, por ke la pertrajna periplo estu sukceso.	5 6
Kiam vi forĵetas viajn ovoŝelojn en rubujon, ĉu vi scias , ke la industrio uzas ĉiujare milojn da tunoj da ili ? Legu pli...	7 8

George Sand natura de la ĝardeno al la verko

Ankrita en la romantika skolo, George Sand ne nur konsideras la naturon kiel pejzaĝon. La verkistino forpasinta antaŭ 150 jaroj, vidas sin kiel elementon el granda tutaĵo. Ŝiaj libroj, kiel ŝia vivo atestas tion.

Estas rilato intima, sentema, sensama, kaj ankrita : George Sand fandiĝas en la kamparo de Berry kaj ŝia verko sin nutras el ĝi. Infano, tiu, kiu naskiĝas Aurore Dupin ricevas tre liberan edukadon dank'al sia aristokratina, erudicia avino. En sia bieno de Nohant, sude de la departemento Indre, tiu ĉi havigas al ŝi la guverniston, kiun havis ŝia filo, malfermas al ŝi sian bibliotekon entenantan Volteron kaj Rousseau, kaj lasas ŝin pasumi en la kamparo. Ŝi ludas pianon, desegnas kaj, evidente, senĉese verkas. Estas akra spirito kaj edukita al ĉio, malofta fakto en tiu epoko por virino. « *Ŝi estas edukita kiel viro, kun granda libereco* », konstatas Elisabeth Braoun, administrantino de la bieno de Nohant. La juna knabino rajdas ĉevalon, pasiiĝas por la grundaj sciencoj – dum sia tuta vivo, ŝi serĉis fosiliojn, observis la papiliojn, faris herbariojn en Francio, en Italio, en Grekio…- kaj adolto, ŝi interrilatiĝas kun



Portreto de George Sand far Auguste Charpentier (1838).

medicinistoj, botanikistoj aŭ entomologoj. La grenejo de la loĝejo, transformita por ŝia filo Maurice en atelieron, superfluas de specimenoj rikoltitaj. Ŝi volas kompreni tion, kio ĉirkaŭas ŝin kaj sekvas la sciencajn progresojn de sia tempo.

Sand konstante interesiĝas pri pejzaĝo, taŭga por la romantikoj, en sentema modo. Kiel ŝi skribas tion, en *François le Champi* : « *Mi volus […] neniigi en mia memoro la instruojn kaj la artoformojn ; neniam pensi pri la pentraĵo, kiam mi rigardas la pejzaĝon, pri la muziko, kiam mi aŭskultas la venton, pri la poezio, kiam mi admiras kaj gustumas la tutaĵon. Mi volus ĝui ĉion instinkte, ĉar tiu grilo, kiu kantas ŝajnas al mi pli ĝoja kaj pli ebriigita ol mi* ». Sed trans la simpla dekoro, ŝi konceptas naturon, pejzaĝon kiel komunan bienon, kiu nepre devas esti konservita kaj alirebla por ĉiuj. Ŝi ankaŭ ligas la naturon kaj la socialaĵon kaj maltrankviliĝas pri la tro impona grunda ekspluado kaj la antaŭgardo de la akvaj riĉofontoj. Sobreco kaj etiko vigligas ŝin.

En ŝia fruktarbejo, la varietatoj estis lokaj kaj ŝia ĝardenisto havis la plej altan salajron el la tuta dungitaro. Per ŝpato mane, tiu hiperaktivulino ĝardenas plurajn horojn tage kun tio, kion ŝi nomas « pasio de stultulo ». En unu el forcejoj, *« oni alklimatigis ananason, kiu finiĝis sur la tablo. Kiel la akvomelonoj* », rakontas Elisabeth Braoun. Benjamin Aubourg, la nuna ĝardenisto de Nohant gvidis restaŭradon en 2023 kun legomĝardeno malvastigita kaj naturaj herbaĵoj. « *Ŝi venigis semojn de ĉie kaj eksperimentis en siaj ĝardenoj. Ŝi antaŭvidis akvan* provizaĵon *kaj jam maltrankviliĝis pri modifoj sur fruktarboj en Saint-Germain-en*-Laye. »

Dank’al la influo de Gorge Sand, la nigra Valo altiris multnombrajn pentristojn kaj fariĝis regiono de artista kreado, ekstere. Akordiganta ruraĵon kaj intelektan vivon, ŝi tenas salonon en kamparo : Delacroix havas ĉi tie sian atelieron (tiagrade, ke floraj masivoj estas imagitaj por liaj penikoj), Litz ludas ĉi tie, Ŝopeno, ĉi tie longtempe komponis kaj Flaubert pasis kiel amiko. Sed for de la mondumaĵoj, Sand laŭdas aliron al la beleco kaj al la kontemplado por ĉiuj, kaj ŝi gastigas tute simple siajn vilaĝajn najbarojn.

La Centro de naciaj monumentoj, kiu ekde nun administras la lokon, faras sian plej bonan por restaŭri la spacojn en la spirito de la verkistino. « Estas pli sovaĝaj areoj, kiel la subarbaro, kiu estas loko de imagaĵo, indikas Elisabeth Braoun. Tio estas naturo, kiu sajnas sufiĉe sovaĝa, sed kiu estas ankaŭ bone zorgata. » Tiele, oni trovas kaŝitan insuleton, destinatan al la bano kun ŝiaj amikoj. George Sand plene vivas la naturon kaj konsideras sin kiel apartenantan al ĝi. En Impressions kaj Souvenirs eldonita en 1871, ŝi konfidas : « Estas horoj, kiam mi eskapas el mi, kiam mi vivas en planto, kiam mi sentas min herbo, birdo, arbpinto, nubo, flua akvo, horizonto, koloro, formoj kaj ŝanĝiĝemaj impresoj, moveblaj, nedifinitaj […] »

Vera samsentado.

George Sand, ĉefaj datumoj

1804

Naskiĝo la unuan de julio en Parizo de Amandine Aurore Lucille Dupin de Francueil, alinomata Aurore, estonta George Sand.



La kastelo de Nohant, sur la samnoma bieno.

1808

Je la forpaso de sia filo, oficiro, Marie Aurore de Sakso instalas sian nepinon Aurore, kvarjaran en sia bieno de Nohant, en la departemento Indre. Aurore heredas la proprietaĵon je la forpaso de sia adorita avino en 1821.

1836

Sand obtenas la separon de sia edzo, la barono Casimir Dudevant, kiu malŝparegis sian bienon.

1876

La 8an de junio, George Sand eligas sian animon en sia dormĉambro de Nohant. Ŝiaj lastaj paroloj « *Lasu verdaĵon* » petas antaŭgardon de la ĝardeno kaj la deziron kurigi vegetaĵojn sur sia tombo.

La arboj de Fontainebleau savitaj de la artistoj

Mobilizado je la 19a jarcento antaŭgardis tiun naturan spacon kontraŭ forsta ekspluatado.


Komence de la 19a jarcento, la pentristoj de la skolo Barbizon frekventas la Fontainebleau arbaron, ĉarmitaj de la siluetoj de oldaj kverkoj antaŭ siaj pentraĵoj lokitaj ekstere. Ili antaŭprezentas impresionismon. Sed puŝitaj per ilia komerca valoro, la inĝenieroj de akvoj kaj de arbaroj rekomendas elradikigi la oldajn plantarojn en 1839. Iuj artistoj, el kiuj la pentristo Théodore Rousseau, tiam malplantas junajn pinojn nokte. Louis-Philippe finfine retroiras kaj antaŭgardas la jarcentajn speciojn. Pli malfrue, en 1861, la kolektivo obtenas per alta lukto kreadon de naturaj reservejoj. Estas ankaŭ epoko de la unuaj piedaj padoj taŭgaranĝitaj : promenado en arbaro iĝas populara. La malnovaj arboj estas denove minacitaj de imponaj dehakejoj de la ŝtato en 1872, por alfronti la multajn ŝuldojn de milito kontraŭ Prusujo. Kun mobilizado de pluraj artistoj kaj intelektuloj el kiuj Victor Hugo, Claude Monet, kaj George Sand, kiu publikigas tekston de 12 paĝoj, la antaŭgardo de la loko estas obtenita. Plie, unu kverko portas la nomon de la verkistino. Necesas diri, ke ekde sia pasio kun la romantika poeto Musset , en la jaroj 1830, ŝi kutimis promeni en ĝi kun siaj amikoj kaj amantoj.

Ŝi funde esploras *en Impressions et souvenirs, (Impresoj kaj memoraĵoj) eldonita en 1873 : « oni devas peti de la sciencistoj, ke ili montru , ke la jarcentaj arbaroj estas ĉefa elemento de nia fizika ekvilibro, ke ili konservas en siaj sanktejoj vivprincipojn, kiujn oni ne neŭtraligas sendanĝere, kaj ke ĉiuj enloĝantoj de Francio estas rekte interesataj ne lasi nudigi Francion de ĝiaj vastaj ombrejoj, rezervejoj* de humideco necesaj por la aero, kiun *ili spiras, kaj por la grundo, kiun ili ekspluatas* ». Pripenso scienca kaj ekologia.

Tiun artikolon de Agnès Aurousseau aperintan en la Nouvellle République de junio 2026 esperantigis Jeannine Layseman.

Fervoja posedaĵo

La riĉa fervoja historio de Saint-Pierre-des-Corps



Ke la unika historia monumento de Saint-Pierre-des-Corps estas lokomotivo ne estas hazardo… La vaporma͡sino Pacific Chapelon 231 E41 konstruiĝis inter 1936 kaj 1938 kaj aparte trenis la « Flèche d'or (Oran Sagon) », la prestiĝan trajnon, kiu efektivigis la veturon Parizo-Londono. La SNCF (NKFF = Nacia Kompanio de la Francaj Fervojoj) ofertis tiun monumenton de la fervoja historio al la urbo en 1974. Ekde 2014 la lokomotivo restaŭriĝas sur la loko de la eksa Ĝenerala Magazeno de la NKFF fare de la membroj de la Asocio de la aĝuloj kaj amikoj de la vaportrakcio. Tiu mita ma͡sino simbolas tutan fervojan historion, kiu formis la urbon.

La historio de Saint-Pierre-des-Corps, situanta inter Luaro kaj Cher, oriente de Tours (Turo), komenciĝas en la gallo-romana periodo. Tie la romanoj kremaciis la mortintojn. En la mezepoko la vilaĝo ekdisvolviĝas ĉirkaŭ la preĝejo dediĉita al Sankta Petro. Dum longa tempo la komunumo restas kampara kaj malmulte loĝata. En 1828 la borado de la Berry kanalo lanĉas la ekonomian disvolviĝon de Saint-Pierre-des-Corps, urbo situanta sur strategia akso. La civito havos precipe impresan kreskon kun la alveno de la fervojo en 1847 kaj la disvolviĝo de la fervoja industrio en la XXa jarcento. Saint-Pierre-des-Corps fariĝas progresive tre grava fervoja nodo. La urbo transformiĝis per la relo. Uzinoj, fervojistaj kvartaloj, relvojaj subkonstruaĵoj : la fervojo strukturas tie la urban teksaĵon.

La urbo detruiĝas okaze de la du mondmilitoj. Ĝi estas fakte elektinda celo, ĉar ĝi ludas strategian rolon pro sia geografia situo kaj la graveco de sia fervoja nodo. Ĉiufoje ĝi devas reinventi sin. Ĝia arkitektura posedaĵo estas pruvo de la rezisto de la urbo.

Aperinta en librejo en marto 2025 « Saint-Pierre-des-Corps – Civito de la industriaj Tempoj » revenas al la historio de la urbo tra ties industria kaj fervoja posedaĵo. Riĉe ilustrita, aparte per la belaj fotoj de Luc Boegly, la libro prezentas la sinsekvajn metamorfozojn de la civito.

La verko skribiĝis sub la direkto de specialisto pri arkitekturo kaj urboplanismo. Profesoro ĉe Parizo-Sorbono, Jean-Baptiste Minnaert estas membro de la André Chastel Centrejo, franca esplorlaboratorio pri arthistorio de la mezepoko ĝis la nuntempa epoko.

Tiun recenzon de **Samuel Delziani** esperantigis Jean-Mary Simonet

Saint-Pierre-des-Corps—Cité des Temps industriels sous la direction de Jean-Baptiste Minnaert. Photos : Luc Boegly
Norma Editions. (2025).
Prix : 45 euros.

Kulturo ĉirkaŭ relo < Libro >

Parizo-Maroko :
La trajna sperto

Ĉiujare Nassira El Moaddem faras la vojaĝon inter Francio kaj Maroko por pasigi siajn somerajn feriojn en sia familio. Sed farinte ĝin dum jaroj per veturilo, poste per aviadilo, ŝi decidis iri al la vilaĝo per trajno. Por rakonti tiun fervojan aventuron, la ĵurnalistino publikigas libron, kiu oscilas inter vojaĝrakonto, praktika gvidlibro kaj membiografio.


Nassira El Moaddem.

Ĵurnalistino kaj aŭtorino |Les filles de Romorantin (La knabinoj el Romorantin), Edition de l'Iconoclaste, 2019], Nassira El Moaddem publikigas ĉe Gallimard libron, kiu konstituas belan deklaron de amo al fervojaj vojaĝoj kaj revivigas ĉiujn siajn memoraĵojn forĝitajn en trajnoj kaj en stacidomoj.

Ŝi revenas kun iom da nostalgio al la longaj vojaĝdistancoj de sia junaĝo, premita meze de sia familio en la Peugeot 505 peze ŝarĝita per donacoj por la familio kaj la marokanaj amikoj. Malgrandaj intencoj, kiuj okupas grandan lokon en la kajuto, ĝis la tegmento, kie la bagaĝoj estas zorge enpakitaj por eviti la malbonajn surprizojn. Kiel milionoj da Marokanoj vivantaj en Francio, ŝi faris tiel ĉiujare, kiam ŝi estis infano, la vojaĝon inter la du landoj okaze de la grandaj somerferioj.


Inter tiu vojaĝo per veturilo kunligita kun la infanaĝo kaj tiu, kiun ŝi faros pli poste en la plenkreska aĝo, realigota per aviadilo, la ĵurnalistino serĉis kaj trovis novan vojon… la fervojon !

La intima rilato, kiun ŝi konstruis kun la trajno komenciĝis jam en la infanaĝo, kiam la aŭtorino loĝis en la urbeto Romorantin (Departemento Loir-et-Cher), ĉe kiu haltas la Blanc-Argent trajno, unutraka linio, kiu ebligis al ŝi veturi ĉefe al Salbris kun siaj kamaradinoj, por sin eltiri el la lokaj klaĉoj. Mutajn jarojn poste ŝi denove eniĝas en la etan trajnon, sed tiufoje kun la familio, kiun ŝi fondis : *« Hodiaŭ, eskapinte el ĉiuj projektoj pri linifermo, la Blanc-Argent trajno ankoraŭ veturas, pli ruĝbrila ol iam antaŭe kun siaj lastaj modeloj de relbusoj. Mi estas tre feliĉa malkovrigi ĝin al miaj gefiloj kaj samtempe kun ĝi iujn densajn arbarojn de Sologne, kiujn oni trapasas rektlinie. Dank al ĝi postvivas neforigebla parto de mia infanaĝo. »*

Laŭ la ĵurnalistino, la trajno estas sinonimo de aventuroj kaj transkontinentaj vojaĝoj, kiel kiam ŝi estis studentino en Turkio. Tiam en la stacidomo de Ankaro ŝi envagoniĝis en la Trans Asia eksprestrajnon, kiu interligas Istanbulon kaj Teheranon en Irano. Sperto aparte memorinda. Ĉie, kie ŝi studis aŭ laboris, ŝi provis vojaĝi trajne. Transportilo fariĝinta vera plezuro. Kaj plie, nun kiam la klimata urĝeco devigas nin

al pli da sobreco, trajno ebligas al ŝi vojaĝi kaj limigi siajn eligojn de forcejaj gasoj : *« Sur la irvojo Parizo-Kasablanko per trajno kaj pramŝipo ni eligas 30 kilogramojn de CO2. Per aviadilo ni lasis post ni karbonan spuron de 708 kg de CO2, 24oble pli ol trajno ! »*

En majo 2022, ŝi do decidas elekti trajnon kaj trairi Francion, Hispanion kaj partion de Maroko. Por kolekti kelkajn utilajn informojn, ŝi mesaĝas sur la sociaj retoj virtualajn botelojn en la maron, demandante, ĉu la retumantoj precipe en la maroka komunumo havas informojn pri tiu fervoja periplo. *« Subite mi malkovras historion, kiun mi tute ne konis, alian manieron reveni al la vilaĝo, paralelan, iom sekretan, elirantan el la ombro, kien la nekontestata regado de la veturilo ĵetis ĝin . »* Ŝi transskribas en la libro la ateston de ses personoj, kiuj plenumis tiun periplon en kaj inter malsamaj epokoj kaj urboj. Tiuj rakontoj fortigas ŝin en ŝia projekto, kiun ŝi pacience konstruas.



La 30a de Julio sonas la horo de la foriro. La malgranda familio baldaŭ envagoniĝos en la altrapidan trajnon TGV 9713 al Barcelona-Sant, unua etapo de sia vojaĝo. Nassira El Moaddem proponas siajn bonajn adresojn kaj konsilojn, kion ŝi faros je ĉiu etapo de la periplo ĝis ties fina destinloko.

Poste, reveno en stacidomon por entrajniĝi en AVE de la RENFE, kiu faras la vojaĝon inter la ĉefurbo de Katalunio kaj Kordovo, en la koro de Andaluzio. Urbo kun grava islama heredaĵo, sed ankaŭ juda kaj katolika. Resume perfekta kunligo inter la eŭropa kaj nordafrika kulturoj. Poste ŝi entrajniĝas en la Kordova stacidomo « en komfortan Media distancia », kiu kondukas ŝin ĝis Kadizo. Ŝi donas poste ĉiujn utilajn informojn por veturi per buso de Kadizo al Tarifa, enpramŝipiĝi kaj fari la marvojaĝon ĝis Tanĝero. En la stacidomo de Tanĝer – Urbo, ŝi fine envagoniĝas en la lastan trajnon de sia irvojo, kiu kondukas ŝin ĝis Kasablanko.

Post la priskribo de sia irvojo ŝi entreprenas grupi en ĉapitron la plejgravajn praktikajn informojn por organizi sian propran vojaĝon ĝis Maroko. Tiel vi povos kontroli, ĉu, kiel skribas la ĵurnalistino, « *trajno estas inica vojaĝo, invito al revado, eĉ por la plej mallongaj distancoj. Trajno estas neegaligebla… eĉ por reveni al la vilaĝo ! »*

Tiun recenzon de Samuel DELZIANI aperintan en ***la vie du rail*** *de la 9a de majo 2025 esperantigis Jean-Mary Simonet.*


Et si on rentrait au bled en train ? France – Maroc – France de Nassira El Moaddem.
Editions Gallimard Loisirs. (2025)

Prix : 19,90 eŭros

Tio funkcias en Lizio (departemento 56 Morbihano)

NOVIGAĴO : La mil kaj unu vivoj de ovŝeloj

Paro de bretonaj agrikulturistoj transformis sian kuirejfornon en laboratorion por recikli la rubojn en fekundigilon. La ŝelproprecoj estas estimataj ĉe la industriistoj.





Alte sidanta en la stirejo de sia ĉareto kun teleskopa brako, Florence Chédaleux, gvidata de Paul-Gilles, sia edzo, translokas plurajn centojn da kilogramoj da kruda, blanka pulvoro : ovŝeloj kunpistitaj. Establitaj en Lizio (Morbihano), inter Vannes kaj Reno, la paro de agrikulturistoj kutimis ricevi multe da ili, kiujn ili disŝutis por redukti la acidecgradon de siaj bretonaj grundoj. Sed en 2003, la aŭtoritatoj malpermesis uzon de tiuj ne sterilizitaj ŝeloj fronte al riskoj de salmonela propagado, bakterio ofte estanta en krudaj ovoj. Tiam, ili havis ideon sterilizi kaj transformi tiujn ŝelojn por doni al ili duan vivon. Paul-Gilles memoras, ke « komence, la provoj fariĝis en familia forno », Florence finfine trovas bonan procedon por sterilizi kaj apartigi ilin disde ilia maldika membrano interna. Kelkajn jarojn de testoj, analizoj kaj administra odiseo pli poste, la farmbieno akceptas staplojn kaj novan sekretan maŝinon : Terremo'logic naskiĝas en 2018. La bretona entrepreneto nun valorigas jare 6000 tunojn da ovŝeloj, devenantaj de tri ĉirkaŭaj rompejoj. Tiuj strukturoj aĉetas la ovojn de la bredistoj por transformi ilin en ovproduktojn-ovoblankojn, ovoflavojn kaj kirlitajn ovojn-pakitajn kaj pretajn por esti uzitaj en la agronutraĵa sektoro. El la 14 miliardoj da ovoj produktitaj jare en Francio, proksimume 40% ne alvenas en niaj fridujoj sed en niaj murŝrankoj (pastaĵoj, biskvitoj kaj industriaj brioĉoj). La malpli bela flanko de la afero estas la ampleksega kvanto de ŝeloj, kiun ili generas.

Natura sterko

Plejofte destinitaj al enfosado, kuniĝantaj kun la kompoŝto de rubejoj en la plej bona okazo, la ovŝeloj konstituas tamen riĉfonton kun interesaj karakterizaĵoj. Ĉefe entenanta kalcian karbonaton, la ekstera kovraĵo estas sterilizita kaj dense pulvorigita de Paul-Gilles kaj Florence. Tiel transformita, ĝi

estas vendita kiel natura grundoplibonigo-materialo por disŝuti sur la grundojn – anstataŭ la kalko, por « prizorgi la grundon kaj retrovi bonan PH » kiel klarigas Damien Lequitte, laktoproduktisto establita proksime de Lizio.



La esploroj de tiu inĝenia paro ne ĉesas kun tio. Per helpo de regionaj agantoj, ili kreas bioplaston konsistigitan el 15% ĝis 30% de ŝelo, sen petrolo, daŭripovan kaj recikleblan, transformitan en ovskatolojn, en dentoglasojn kaj en rubujojn. Koncerne la internajn membranojn, kun forta enteno je azoto, proteinoj kaj mineraloj, ili reciklas ilin en sterkon. Per helpo de AgWI, entrepreno specialiĝinta pri plantnutrado, ili sin preparas transformi ilin en biostimulantojn, iniciato monhelpita de la Eŭropa Unio. Unu projekto inter aliaj por la entrepreno, kiu serĉas novajn merkatojn. Sed kelkaj sektoroj jam turniĝis al tiu blanka trezoro. Pluraj fabrikantoj de bestonutraĵoj proponas ŝelpulvorojn kiel nutran komplementon por provizi iliajn bezonojn de kalcio. La konstrusektoro ankaŭ uzas ĝin : farbo, kaheladoj, konstrublokoj, endoma dekoracio…oni ĉie ovŝelojn trovas.

Kolagena povo

Ne estas la ekstera kovraĵo, kiu plej ekscitas la avidecojn sed ĉefe la vitela membrano, tiu maldika, organika tavolo algluita interne de la ŝelo, riĉa je kolageno kaj hialurona acido, 2 substancoj tre ŝatataj en kosmetiko. Laŭ la esplorgrupo Global Markets Insights, la merkato de ovŝeloj superis 119 milionojn da dolaroj en 2022 kaj povus atingi 284 milionojn en 2032. Tio povus do veki apetiton de investantoj ĉar tiu produkto posedas atutojn en aliaj kampoj. Esploristoj de Dublin (Irlando) uzis ĝin por apartigi elementojn de raraj grundoj en akvo kaj ekstrakti tiujn nepre bezonatajn substancojn por reciklaj baterioj. Tiu uzado povus prezenti alternativon al mineja ekstrakto samtempe multekosta kaj poluanta. Ĉe Saskatchewan Universitato, situanta en okcidenta Kanado, esploristoj plie kreis granulojn kapablajn depolui akvon pere de ovŝeloj kunligitaj kun aliaj substancoj. Promesoj verdegaj por blanka oro, kiu sin kaŝis sub niaj okuloj.

Tiun artikolon de Samia Mrani Alaoui, fotoj de Mathieu Ménard por la revuo Le Pèlerin, n°7411, 12a de decembro 2024, esperantigis Jeannine Layseman.


1 kaj 3

Paul-Gilles kaj Florence Chedaleux havis ideon sterilizi la ovŝelojn por recikli ilin.Tiuj estas apartigitaj disde sia membrano kaj pistitaj. La ovskatoloj mem estas fabrikitaj per ovŝeloj.

2 kaj 4

La ŝelpulvoro, vendita laŭ mezuro de la eroj, estas pakita en sakego (500 kg), pelmele aŭ en sako de 15 kg por ĝardenbutikoj.





5

Damien Lequitte, laktproduktisto de la ĉirkaŭoj, uzas tiun novan materialon por redukti la acidecon de siaj teroj.